

# H&S

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORINO:  
F-INO CARMEN NAVARRO

Nro. 73 - 1971

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.<sup>a</sup>  
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



LI BEZONAS PLI BONAN MONDON  
NI DONU ĜIN AL LI



# SALUTO

Novan Jaron ni komencis. Kristnaskofestoj, ferioj kaj la arango de la programo por kunmemori la naskiĝotagon de Dro. Zamenhof, malfruigis kelke da tempo la aperon de nia revuo. Ni estus volontaj presie ĝin antaŭ la festoj por deziri al vi feliĉajn tagojn.

Pro tio ke ne estis eble, nun ni sendas al vi ĉiujn niajn plej bonajn salutojn por la nuna jaro.

Ni esperas ke la esperantista junularo daŭrigu entuziasme la taskon por disvastigi nian internacian lingvon kaj ke nia revuo estu ĉiufoje pli interesa.

Por tio ni atendas, kiel ĝiam, vian kunlaboron. Alifoje feliĉan jaron por vi ĉiuj kaj ni esperas ke la jena revuo estu de via aprobo.


## LA ESTRARO

. . . . .

### E N H A V O

### PAGŬ

Saluto	.....	1
Kristnaskofesto	.....	2
Teatraĵo	.....	3
Esperanta Kulturo	.....	4
Por Pripensi.....	.....	5
Kultura Grupo	.....	6-7
La Planedo Marso..	.....	8
Imagita Intervjuo..	.....	9
Uzo de Esperanto	.....	10
Esperanto-Poŝtmarkoj	.....	11
Bilanco	.....	12
Donacoj	.....	12
Noto	.....	12



# KRISTNASKOFESTO

Lumigitaj arboj en la placoj.

Lumigitaj montrofenestroj ĉie.

Lumigitaj montriĝas la stratoj.

Lumoj multkoloraj tie kaj ĉitie.

Homoj kurante kun frenezo.

Ĉie ajn lukso kaj parado.

Ĉu estas necese tia falsa

montrado de riĉeco.....?

Aliloke, pro malsato,

infano ploras en nia mondo.....

Aliflanke, pro miskonpreno,

knabo suferas en nia mondo.....

Ĉiu lumo

kulpiga okulo !.

Ĉiu lumo




puna vangofrapo !.

Ĉiu lumo

nigra ŝtono en la koro !.

Ĉiu lumo

krio de maljusteco !.



MARIA



# TEATRAJO

Por la unua fojo en la historio de nia grupo, oni rolis teatraĵon originale verkita en Esperanto " LA TAGO KIAM KARLA VENIS " de J.J. Juanes.

Sinjoro Juanes verkis tiun dramon kun vera entuziasmo kaj li atingis profundan kaj homan historion.

Ĝi estas ambicia amdramo, naskiĝita en la klasika triangulo.

Ni memoru tiun frazon de GOETHE, kiam komencanta verkisto petis al li temon por romano.

Lia respondo estis: "Viro amas virinon, ne ekzistas pli bona temo".

En " La tago kiam Karla venis " la amo havas tre gravan rolon.



Estas tri personoj perfekte difinitaj, kun siaj difektoj, siaj malvirtoj, siaj virtoj kaj siaj esperoj.

La aktorok kiuj rolis la tri personojn metis ĉion el sia flanko por ke la verko havu grandan sukceson. Iliaj nomoj laŭ aperordo, : M<sup>a</sup> Iciar arte che en "Nora", José Fariñas en "Lino" kaj Carmen Navarro en "Karla".

La kialo ke ĝi estis reprezentita esperante, kvankam malgrandigis la ĉeestantaron kaŭzis ke la ĉeestantoj ĝuis pli multe pri la verko, kaj instigis la aŭtoron kaj la geaktorojn daŭrigi la celitan vojon.

De tie-ĉi ni donas al ili la plej sincerajn gratulojn.

Meyko



## Ceesto al la esperantaj kursoj

Kiel okazas en la lernado de eksterlandaj idiomoj, la ĉeesto al la kurso estas ĝenerale ne konstanta.

Dum la unuaj semajnoj, multe da lernantoj komencas la studadon de la internacia lingvo; poste la nombro iom post iom malpliigas, kaj fine nur restas la veraj interesataj. Oni temas pri natura fenomeno, ĉar la unuaj ĉeestis puŝitaj de la propagando, aŭ eble de homa scivolemo; sed rilate la lastaj, ili restas fidelaj al sia propono kaj finas la kurson.

Dank'al tio, ili akiras supraĵan konon de Esperanto kiun ili devos perfektigi dum sinsekvaj kursoj. Tio ne okazas ĉar ili kontentiĝas konstatante ke nun ili jam povas skribi simplajn poŝtkartojn eksterlande kaj iomete paroli kun esperantistoj. Fakte, tio konsistigas etan venkon, sed verdire, la elementa paŝo farita de ili preskaŭ nenion valoras el la lingva vidpunkto. Ili ne devas forgesi ke por akiri la necesan fluecon estas nepre kondiĉo efektiviĝi mezan kurseton kun la celo venki kelkajn malfacilaĵojn pri la konstruo kaj sintakso de nia propra lingvo. Kompreneble tiam ili konstatas ke la afero prezentigas iom dorna kaj konsekvence pluraj lernantoj aŭ lernantinoj forlasas la studadon de Esperanto.

Ankaŭ alia konsiderinda faktoro estas la kaŭzo de la menciita forlaso nome: la ideo eltiri de la koncerna studado, tujan monan profiton, ĉar bedaŭrinde oni kutimas ĵuĝi Esperanton rilate al ĝia utilo kaj estonta apliko.

(Daŭrigota)



JAIMÉ ARAGAY



# POR PRIPENSI

La hipioj ĝenerale estas tre kritikitaj homoj kaj ĉian nefavore. Kelkaj kulpigas ilin kiel, mal-laboremuloj, vivuloj, drogemuloj, amikoj de seksaj aberacioj ktp.

Aliaj, la plej liberalaj kaj demokrataj, kiuj sin nenommas progresistoj, diras ke ili estas fenomenoj propraj de avantita kaj evoluciita socio, (kiel Anglio, Francio,...) sed funde, feŭdalistoj kie ekzistas subprenantoj kaj subprematoj.

Laŭ mi, ambaŭ opinioj estas eraraj

1<sup>o</sup> Oni kritikis ilin sen analizi la kialon de tiu fenomeno.


2<sup>o</sup> Ĉar oni observas ĝin kiel fenomeno propra de avantita, evoluciita kaj samtempa socio.

Laŭ mia opinio, la hipioj estas produkto de re-akcia socio, kiu ne montras al tiuj homoj la veran koncepton de aŭtentike, kolektiva socio. En tiuj kondiĉoj la hipioj estas nekonformaj pri la sociaj strukturoj, ĉar ili vidas en ĝi, la daŭrigon de malnova socio sed pli evoluciita kiu posedas la samajn antaŭjuĝojn kiel tiu de niaj antaŭuloj kun la nura ŝanĝo ke, pere de la batalo de milionoj da homoj tra la jarcentoj, tiuĉi socio kontraŭ kiu ili protestas estis devigata fari kelkajn koncesiojn sed definitive ĝi daŭrigas havante la plej grandan parton de la neaj pezoj.

Bedaŭrinde, la hipioj ne rinarkas ke la nura ebla maniero por farigi la neajn strukturojn, sociajn kaj politikajn, oni atingas pere de la ĉiutaga laboro, sole la maniero por atingi veran, socian, laboran kaj kolektivitan konsciencon.



K A R E N L E





Ni estas parolante kun la Prezidanto de la Grupo Lasser de Alicante, Sro. Francisco Mas Magro, kiu havis la afablecon fari kelkajn deklarojn por la revuo HEJS.

-Kio estas la Grupo Lasser ?.

Ĝi estas grupo kiu havas la taskon instigi la kulturon en la provinco, ĝi kunordigas la kulturajn aktivajn de aliaj grupoj de Alicante. Krone ĝi estas iaspeca agentejo de intelekta propraĵo; ĝi havas rilatojn kun kulturaj grupoj kaj ĝi povas organizi aktivajn kun aliaj grupoj kiuj ne apartenas al ĝi. Ĝi konsistas el tri partoj: Literaturo, plastikaj artoj kaj Muziko.

-Kiaj celoj persekutas ?.

Mi kredas ke mi respondis antaŭe al tiu demando parolante pri la aktivajn de la grupo, provinca, kiuj ekde 1972 j. havas nacian karakteron, kreante grupojn en Granada, Madrid, Barcelona kaj Valencia. Tamen mi povas aldoni ke ĝi aktivigas kaj estigas la kulturo sen definitaj ideologioj nek antaŭjuĝoj kiuj povus devojigi el la plej gravaj celoj.

-Kiel ĝi naskiĝis ?.

En Granada oni rimarkis la kulturan etoson surstrate el kafejoj, teatroj ktp. en Alicante nenion. Oni pretendis krei movadon por estigi la kulturon ĉi tie.

-Kiu formas ĝin ?.

Ĝi estas formata de naŭ personoj, poetoj kaj pertristoj.

-Kiajn monrimedojn ĝi havas ?.

Ĝi havas proprajn monrimedojn el kiuj formas la grupon kaj subvenciojn de oficialaj organismoj, danke al kiuj oni realigis kelkajn aferojn malgraŭ laj opozicioj.



-Kia rolo korespondas al ĝi en la socio ?.

Precipe alporti la kulturon en la popolon.

-Ĉu vi kredas ke ĝi tion atingos? .

Jes, se oni organizas adekvatajn ciklojn, la popolo, precipe, la juna popolo, montras grandan intereson kompreneble tial ke tiu junularo ne havas firman kulturan bazon, ne ĉiuj ideoj estas asimilitaj, sed kelkaj el ili estas komprenitaj. En iu vilaĝo kie ni estis oni prezentis nin kiel "Les Lasser" kvazaŭ ni estus muzika ensemblo. Ni intencas krei revuon kiu ni dezirus ke ĝi estus senpaga, sed kiel ĉiam ni havas monproblemojn kio ŝajnas nekomprenebla estas ke la lokaj ĵurnaloj ne okupiĝas tre malmulte tiel grava temo kiel la kulturo aŭ priokupiĝas tre malmulte.

-Ĉu Lasser estas kunigita al iu alia pli granda grupo?.

Ne, okazas kontraŭe, Lasser kunigas aliajn pli malgrandajn grupojn.

-Iom da historio pri la grupo: Ĝi komenciĝis per radia programo; oni radiis programojn pri poezio, precipe regiona kaj ankaŭ pri muziko. La eldono de la revuo pri kiu ni jam parolis antaŭe kaj ekspozicioj pri diversaj temoj. La lastaj aktivajoj estis ekspozicio pri aplikita poezio kiu havis grandan sukceson kaj festivala muziko pri la Valencia regiono kun partopreno de kantistoj de la tuta regiono.

-Kiel oni povas aparteni al la grupo ?.

Povas aparteni ĉiu kiu volas kaj kiu interesiĝas pri ĝiaj celoj.

-Projektoj por la estonteco: Ĉiudujara kultura elmontro en Alcoy dediĉita al kulturo, poezio, muziko, pentrarto, teatro, konferencoj ktp. aparte ekspozicioj pri skulptarto, pentrarto, ilustrira poezio ktp.

-Ĉu vi kredas ke estas io necesa la laboro farita ?

Ĝi estas tre necesa por atingi la kulturan integracion de ĉiuj. Ni kredas ke ĝi povas atingi kaj ni ĉiuj estas laborante pro ĝi.

CONCHITA

Kiu ne scias pri la lasta atingajo de la tekniko? Mi aludas tiun raketon, laŭdire usona, kiu konstante ĉirkaŭiras la planedon Marso-n kaj kiu santepe spionas ĝin. Ni jam venkis la Luno-n, nun alvenas la vico de Marso. Feliĉaj estos miaj nepoj, kiuj ne nur troviĝos en la Luno sed eĉ en Marso.

El la spionaĵoj senditaj al nia planedo, la Tero, por mi havas specialan intereson tiu pri la akvoekzisto, des pli ĉar oni diras ke tiu akvo estas gasca, nebulforma. Tial estas logike ke tuj venis al mia menso la demando, kiel estas la akvotrinkiloj en Marso?, kompreneble sub la supozo ke tie ekzistas vivantaj estaĵoj. Vero estas ke la akvotrinkiloj de la marsanoj ne maltrankviligas min. Sed kio pri la teranoj kiam ili iros tien? Kio pri miaj nepoj? Ĉu kiam ili troviĝos en Marso konstante devos fermi kaj malfermi la buŝon por kapti la gasecan, nebulforman akvon? .

Ho ve! mi pensas al niaj ordinaraj kaj malmulte laŭdataj akvokruĉoj, kiuj tion malvarnigas la akvon (precipe dum vintro), tiuj akvotrinkiloj arte faritaj el argila tero, modelitaj per la propraj manoj de la artisto, poste kuiritaj kaj pli poste... frakasitaj de niaj infanoj. Eble ni ne pravas, sed en mia opinio, tiuj respondeculoj, kiuj intencas alvenigi la teranojn al planedo Marso, devus kontakti tiujn artistojn, kiuj faras la tipajn hispanajn akvotrinkilojn, kaj kiuj, laŭ miaj informoj loĝas en la provinco de Zamora.!! Irontoj al Marso aĉetu akvotrinkilojn adaptitajn al la marsa trinkmaniero!! . Ne estus malbona reklamo por la eksportado.

Nur forpasis sekundoj kaj mi jam havas alian ideon, ĉu ne estus pli racie konsili al miaj naskiĝontaj nepoj, ke ili restu en Hispanujo, por ke ili povu trinki la famajn vinojn el Montilla, Ribeiro, Rioja, Málaga, Jerez, la ĉampanon de Vilafranca del Panades kaj tiujn konjakojn, kiujn anonas tiuj hispanaj belulinoj?. Senintencas mi skribis inojn (belulinoj) kaj mi ne dubas ke miaj nepoj multe sopiros al la marsaninoj ĉar eĉ nun mi ilin...salutas. Jen la problemo.

LUIS SERRANO PEREZ

IMAGITA INTERVJUO AL IU ESPERANTISTO ĈEESTANTA

LA KONGRESOJN !!!

Demando. - Kiel estis ĉi-jare la Kongreso ?.

Respondo. - Kiel ĉiu jare ĝi okazis en grandega urbo nur mi povis vidi la turisman parton, por la sekvontaj jaroj estus konvene plilongigi la Kongresojn aŭ ke ili okazus en pli malgrandaj urboj.

D. - Ĉu vi ĉeestis iujn el la programeroj ?.

R. - Mi ĉeestis la oficialan kaj junularan balojn, kiuj verdire estis tre bone organizitaj, la L.K.K. alifoje pruvis sian kompetentecon.

D. - Ĉu vi havis okazon fari novajn geamikojn ?.


R. - Jes, kompreneble, mi "ligis" al belega esperantistino, mi povas certigi ke tiu-ĉi jaro ne estis perdita.

D. - Ĉu vi povas diri ion pri la konferencparolantoj ?

R. - Mi ne partoprenis la konferencojn, sed mi scias per alia ke ili estis tre brilaj kaj kvankam mia sciiganto estis trinkante bieron dum ilia okazado, li diris min ke je la fino li aŭdis longajn aplaŭdadojn.

D. - Fine bonvolu, diru al mi: ĉu vi daŭrigos partoprenante la kongresojn ?.

R. - Kiel vi povis rimarki dum ĉitiu intervjuo por mi, partopreni la kongresojn estas la plej grava afero kion mi povas fari pro Esperanto, kaj mi senfine frekventados ilin.

 ROSALIA //

# UZO DE ESPERANTO

Antaŭ kelke da tempo, pro familiaj aferoj mi de vis viziti la urbon Pontevedra. Kiam oni sciis en mia E-Klubo ke mi vojaĝus tien, iu diris al mi "ki al vi ne vizitas la Delegiton de UEA en tiu urbo?, li estas bonega esperantisto kaj tre simpatia persono".

Mi kumportis lian adreson kaj tuj post alveni Pontevedra-n, mi telefonis lin. Rapide li demandis min: "kie vi troviĝas, mi povas iri renkonti kun vi" Efektive, post kvin minutoj ni nin renkontis.

Li invitis min al sia hejmo por prezenti al mi sian familion kaj tie mi havis agrablegan surprizon, lia tuta familio (kiu konsistas el tre simpatia edzino kaj kvin ĉarmaj filoj) parolis Esperanton. Mi estis ravata ĉar ĝi estis io tute neatendita por mi.

Kvankam jam estis mia tria vizito al tiu urbo, ankoraŭ mi ne konis ĝin, unue ĉar ĉiam mi faris tre rapidajn vizitojn (nur 1-taga restado) kaj due ĉiam mi promenis tra la samaj stratoj por ne perdiĝi, ĉar mi konis neniun kiu povus montri al mi la urbon.

Cifoje estis malsame, mi konis la tutan urbon, la plej vizitindajn lokojn, akompanata de ĉarma "E-gvidisto", la plej aĝa filo de la Delegito, tre simpatia knabo kiu bonege parolas Esperanton.

Kiam ni kune ekforlasis la hejmon la patro diris: "Petro, tre bone parolas Esperanton, sed li timas ĉar li ne havas multajn okazojn paroli kun aliaj E-istoj" Do, mi diris al Petro ke li devus montri al mi ĉion sed parolante Esperanton kaj efektive dum la tuta tempo ni paroladis nian karan Internacian Lingvon. Ĝi estis por mi neforgesebla vizito.




Instigis al mi skribi tiun-ĉi artikoleton ĉar kelkfoje mi aŭdis diri ke Esperanto nur oni devas uzi kun eksterlandanoj. Laŭ mia modesta opinio, ni havas pli multajn okazojn paroli kun samlingvanoj, tiamaniere kiam renkontos eksterlandanojn ni parolos multe pli flue.

M<sup>a</sup> JOSE

ESPERANTO-- POSTMARKOJ

1911 Bavario	5 Pf. kun kupono	"Esperanto München"
1925 Sovetunio	7 kaj 14 kopekoj	"Popov-inventisto"
1927 Sovetunio	7 kaj 14 kopekoj	"SAT-Kongreso"
1926 Sovetunio	14 kopekoj	"40 jaroj Esperanto"
1927 Sovetunio	Surpreso 8 kop. sur 7 k.	"Popov"
1927 Sovetunio	Surpreso 8 kop. sur 7 k.	"SAT-Kong."
1930 Sovetunio	1 rublo	"Centra Telegrafo"
1932 Sovetunio	3 rubloj	"HES je la nomo de Lenin"
1935 Brazilo	200 reis	"Specimena Foiro"
1936 Brazilo	200 reis	"Specimena Foiro"
1937 Brazilo	300 reis	"9 <sup>a</sup> Kongreso Esp."
1937 Brazilo	300 reis	"Ora jubileo de Esp."
1945 Brazilo	40 ct. 1'20 cr.	"Esp.-Kongreso"
1947 Bulgario	20 + 10 levoj	"30 bulgara Esp-Kong."
1949 Aŭstrio	Aerogramo Wien-Philadelphia	
1950 Aŭstrio	20 groŝoj	"Esperanto"
1953 Jugoslavio	15 k 300 dinaroj	"38 <sup>a</sup> U.K. de Esp. "
1953 Trieste B.	15 k 300 dinaroj	"38 <sup>a</sup> U.K. de Esp. "
1954 Aŭstrio	44 stotinkoj	"50 jaroj de Esperanto"
1957 Bulgario	44 stotinkoj	"50 jaroj de Esperanto"
1957 Hungario	60 fileroj 1 florinto	"70jaroj de Esp. kaj Z."
1959 Bulgario	1'25 levoj	"Zamenhof"
1959 Pollando	60 groŝoj kaj 1'50 zl.	"Zamenhof"
1960 Brazilo	6'50 crs.	"Zamenhof"

Mi atendas la skribojn de la legantoj pri filateliaz temoj .



Kun amikaj salutoj : JAIME MOLERA  
Sta. Joaquina, 13  
MOYA--(Barcelona)

BALANCE AL 31-12-71 QUE PRESENTA HEJS

Gtos. impresión revista y material oficina	10.148	
Gtos. expedición	3.182	
Importe cuotas pag. a HEF	504,50	
Gtos. varios	261,50	
Capital (Fondo inicial)		5.500
Cuotas año en curso y atrasadas		12.675
Beneficio Lotería		7.859
Donativos		2.081,65
Intereses		6,42
Caja y Cta. Cte.	14.026,07	
	<hr/>	<hr/>
T O T A L	28.122,07	28.122,07
	<hr/>	<hr/>

DONACIÓJ AL H E J S

J. Salvá	50 Pts.
F. Soler	50 Pts.
J. Azcuénaga	100 Pts.
A. Criach	300 Pts.
G <sup>o</sup> Stelo de Paco	125 Pts.

La Bilbao'a Grupo havas alumetojn kun propagan-  
do pro Esperanto. Se vi deziras aĉeti ĝin por dona-  
ci al viaj geamikoj, mendu ilin al ni.

Prezoj : 1 Peseto po skatoleto .